

## & La Kri':

< Rekante 31 el 59 batoj por strofo, entute 885 paŝoj dum 16 minutoj. Verkis F. D. Murphy. Valson detruis al balada melodio Martin Strid (2015). Klarigoj (\*): '11 Breĵnev, sovetunia registarestro ; Carter usona prezidanto ; Hua, ĉina registro.>

### (#Melodio:

<:59> (So /mi redo re doLa So Mi; So mi redo do Tido re e; So mi redo re doLa So Mi; So La redo Ti LaTi do o;

(#Rekantaĵe: So o do o La a re e Ti TiTi Ti LaTi do re mi i; So o do o La a re do Ti TiTi Ti LaTi do So do)

)×14 )+

### (&Strofoj:

'1 Sur montoj kaj step' indianoj ;  
ĉasadas kun ruĝfamili'. ; Kaj se vi  
postulas parolon, ; kanjono respondas  
per kri':

(×: **Esperanto – estas la lingvo por ni, por ni! ; Esperanto – ja estas la lingvo por ni, por ni!**)

'2 En densa Afrika ĝangalo ; sovaĝaj  
nigruloj sen Di' ; jam solvis la lingvan  
problemon, ; per tam-tam' disiĝas la  
kri': .....

'3 Ĉe norda poluso eskimoj ;  
Loĝadas en neĝo, glaci' ;  
Kaj kiam parolo necesas ;  
Trans blanka dezert` sonas kri` .....

'4 Sur tuta ĉi vasta terglobo, ; en urboj  
de ĉiu naci' ; troviĝas la samideanoj, ;  
soniĝas la tutsama kri': .....

'5 Indianoj, eskimoj, nigruloj, ; urbanoj,  
kaj buboj, kaj ni ; jam uzas la  
Zamenhof-lingvon, ; do vivu, prosperu  
la kri': .....

'6 Post longa penad' kaj turmento, ; jes,  
venis ja fine la tag'; Ekflirtis en freŝa la  
vento ; tutmonde la verdstela flag': .....

'7 Sur monto, en val' fruktodona, ; en  
urbo, vilaĝ' kaj kampar', ; eksonis la  
kanto belsona. ; de nenombrigebla  
fratar': .....

'8 En neĝo ĉe globaj polusoj, ; en  
varmo de granda ĝangal', ; ĉe ĉinoj kaj  
angloj kaj rusoj, ; triumfis la akra  
signal': .....

'9 Survoje de fora stelaro, ; raketoj en  
grandformaci', ; urĝadis tra spaca la  
maro ; gvidataj al teron de l'kri': .....

'10 En Unuiĝintaj Nacioj ; de tuta la  
delegitar' ; aŭdiĝis tre laŭte la krioj ;  
sen helpo de tradukistar': .....

'11 Eĉ Breĵnev\* kaj Carter\* kunsidis ;  
kun Hua\* en ĉina hotel', ; babilis kaj  
ludis kaj ridis ; kaj kantis sub verda la  
stel': .....

'12 "Neniam plu lingvaj problemoj ;  
kaŭzigu militon en mond'!", ; proklamis  
la tri' kun manpremoj ; kaj kantis  
denove en rond' : .....

'13 Varmkora estiĝis la mondo, ;  
paciĝis ja ĉiuj popol', ; influe de granda  
la rondo ; marŝanta sub verda simbol':  
.....

'14 Jes, bela fariĝis surtera ; la vivo de  
ĉiaj estaĵ', ; ŝanĝiĝis la tempo mizera ;  
per helpo de verda miraj': .....

'15 Subite de l' tuta epoko ; plu restis  
neniu ol mi, ; ĉar el la ĝardeno de l'  
koko ; eksonis vekiga la kri': .....